Velen trachten het werk te bespoedigen door Engels of Frans te spreken. Maar, zegt een der tolken, sommige gedelegeerden zijn zó slecht te verstaan, dat de vertalingen weinig meer dan op de gis gemaakt kunnen worden. De Mexicaanse vertegenwoordiger dr. Francisco Castillo Najera, ongetwijfeld een groot orator in het Spaans, is ternauwernood te volgen als hij Frans spreekt.

De Franse tolken pijnigen hun hoofd bij het Engels, dat de Australiër, Lt. Kol. William Roy Hodgson spreekt. Dan doet hun Engelse collega zijn best om hun in het Oxford accent, waaraan zij gewoon zijn, de rede in het oor te fluisteren.

Als wij zulke dingen lezen, ja dan zeggen we:

Petje af voor zulke tolken, maar.... waarom zou men dan zijn hoed niet afnemen, voor ons doodgewone mensen van alle dag, die het den heren wel anders kunnen leren?

Nooit gehoord van Esperanto?

Merk dan op wat de Norrköpings Tidningen van 17-7-1946 e.a. Zweedse bladen vermelden van het feit:

dat Hollandse spoorwegmannen Zweden bezochten en hun esperantovrienden, evenals de esperanto sprekende wagenvoerders van de eigen trein van een Bulgaarse handelsdelegatie. Zij konden zich onderling verstaan en op de Esperanto-zomercursus te Jursla waren deze buitenlanders, met nog andere nationaliteiten aanwezig, n.l. Denen, Noren, Finnen, Polen, Hongaren en Esten, met de Zweden dus 9 verschillende naties, en ongedwongen was hun omgang.

Taalmoeilijkheden deden zich niet voor, aldus deze Zweedse bladen. Doch dit waren dan ook maar eenvoudige mensen en daar let de wereld niet zo erg op.

I.L.E.P.T.T.

Internacia Ligo por Esperanto en Poŝto Telekomunikoj kaj Transporto.

Antaŭ kelkaj monatoj la Generala Sekretario s-ro Robert Filliatre, jam anoncis la restariĝon de la Internacia Ligo de P.T.T.-Esperantistoj, kies Centra Oficejo estas en Francio. Post la reaktiviĝo en 1945 aliĝis ankaŭ la Francaj Fervojistoj kaj Transportistoj. Ili prave opiniis, ke estas pli bone havi unu fortikan trafikunuiĝon ol kelkajn etajn.

Ankaŭ en aliaj landoj oni sekvis tiun ekzemplon kaj la ligo nun jam havas pli ol *1500 anojn* en la tuta mondo.

Antaŭ la milito ĝi eldonis monatan revuon, kiu estis unu el la plej belaspektaj. Tiun gazeton la Centra Oficejo denove eldonas. La unua numero jam aperis kaj la dua baldaŭ sekvos. Al Nederlando estas dediĉita la numero kiu aperus en aŭgusto. La enhavo certe tre interesos la trafikistojn; ni tial konsilas aboni ĝin ĉe unu el la ĉisubaj adresoj.

Sendu poŝtmandaton de gld. 3.50, tio estas la kotizo por unu jarabono. Bonvolu mencii vian funkcion kaj naskiĝdaton.

En Nederlando la Ligo estas reprezentata de la jenaj personoj:

Ĉefdelegito kaj Landa Kasisto:
S-ro Jacob Telling, poŝtoficisto, Schietbaanlaan 106a, Rotterdam-C.

Loka Delegito en Hago kaj Delegito pri la fako Poŝtista.
S-ro R. Ch. G. de Wilde, poŝtoficisto, Vlierboomstraat 303, Den Haag-W.

Loka Delegito en Amsterdamo kaj faka Delegito Fervojista:
S-ro H. Hoen, fervojisto, Madurastraat 71', Amsterdam-O.

Loka Delegito en Utrecht
S-ro H. de Ridder, fervojisto, Noordzeestr. 47, Utrecht.

REDAKCIOJ DE ESP. GAZETOJ

Sendu viajn gazetojn interŝanĝe al: Red. Laborista Esperantisto, Middenweg 226, Amsterdam-O.



BESTUURS MEDEDELINGEN

Radio.
Zaterdag 5 October 1946 van 4.15—4.30 uur spreekt voor de Vara, 301 m., H. Suurmans.
Onderwerp: De Minotaurus leeft nog.

Ledenlijsten en contrib. 4e kwartaal.
Wij maken de besturen van afdelingen en districten nog even opmerkzaam op de nieuwe regeling, welke van 1 October 1946 af geldt.
De afdelingen sturen, van bovengenoemde datum af, de ledenlijsten en contributies aan hun stedelijke of provinciale district. Ook alle wijzigingen geve men aan deze instantie op. De achterstallige contributies moeten echter nog op de gewone wijze aan den bondspenningmeester worden voldaan.

F.L.E.-Amikaro.
De afdelingen en districten dienen de ingevulde aanmeldingsformulieren van de F.L.E.-Amikaro maandelijks in te zenden. F.L.E.-amikoj, wier contributie f 2.50 of meer bedraagt ontvangen ons blad gratis.

Propaganda-congres te Utrecht.
Zij, die kaarten hadden besteld, gelieven zo spoedig mogelijk het verschuldigde aan den bondspenningmeester over te maken.

Facile Lerni Esperanton.
Het nieuwe leerboek van k-do G. P. de Bruin „Facile Lerni Esperanton" is reeds verkrijgbaar. De prijs bedraagt f 1.10.

Instrua Servo.
De afdelingen en districten ontvingen een circulaire van de I.S. inzake de schriftelijke cursusen voor beginners, en voor de diploma's A. en B. Nadere inlichtingen bij de I.S. p/a. k-do H. Kuyt, Ruyschstraat 131², Amsterdam-O. (Zie voorts op pag. 77).

Een nieuwe afdeling.
is in Laren-Blaricum opgericht, secr. k-dino M. Greefkes, Bij den Toren 17, Laren N.-H., alsmede in Goes.

Jeugdcomité.
Er vond een bijeenkomst plaats van enkele jongere leden met enige hoofdbestuurders. Men besloot tot oprichting van een comité, dat zich zal bezig houden met bijzondere werkzaamheden voor en onder onze jeugdige leden. Nadere mededelingen volgen.

L.E. voor de cursisten.
Ten behoeve van de cursisten kunnen de afdelingen collectieve abonnementen bestellen op L.E. Tegen betaling van f 0.50 ontvangt de cursist via de afdeling ons orgaan gedurende zes maanden.

El la estrarkunvenoj

Pro la morto de k-do Veen montriĝis necese redividi la estrarajn taskojn. Ĝis la kongreso en Heerlen k-do Faulhaber plenumos la funkcion de prezidanto. Pri la internlaboro okupos sin, konforme al la kongresa decido, komitato, konsistanta el k-do Suurmans, k-do Borsje kaj k-dino Rijpstra. Pri la kontakto kun la junaj membroj okupos sin k-do Velthove. Por tiu laboro stariĝis speciala komitato. En la komitatoj por NCKE kaj LEA-oj k-do v. Haren anstataŭos k-don Veen.
Estis fiksata speciala abonprezo de L. E. por kursanoj. En Heerlen okazos modelekspozicio prizorgota de nia estrarano De Vries. Por la vojaĝantaj bibliotekoj estos kompilataj kelkaj kestoj da libroj.
Ĉe la kasraporto pri la unua duonjaro de 1946a montriĝis, ke la abonantoj de L. E. kaj L. P. (kolektive kaj individue) ne jam pagis. Ankaŭ la pagado de la sekcia kotizo ne estis kontentiga. **La estraro decidis, ke estontece la nepagintoj ne plu ricevos la gazetojn.**
Plie la estraro priparolis la situacion en Flandrio. Se eble k-do Kruit[1]) paetoprenos la kunvenon en Antwerpen je 15a de Sep. la estraro pritraktis la Oficialan Komunikon de la P. K. en S-ulo de Aŭgusto. La komento de B. Wels ŝajnas al ĝi tute prava kaj la anticipa forrifuzo de Internacia Centra Komitato, konkludebla el la vortoj de la P. K. ne faris bonan impreson, ĉar tia komitato konforma al la nederlanua centra komitato certe estas dezirinda.
Fine estis priparolataj kelkaj korespondajoj kaj kelkaj proponoj por N.C.K.E. koncerne komunajn aranĝojn en la estonteco. D.K.

[1]) Tio ne eblis pro tro longdaŭra pretigo de pasporto. Ni letere konigis nian opinion.

Nia nova lernolibro

Estas kompreneble, ke tiom longe kiam oni ne estas kontenta pri la rezultatoj de iu instru-metodo, oni serĉas metodon pli efikan. Jen, kial aperas nia nova lernolibro, frukto de tia serĉado. Ĉar, efektive, la rezultatoj de niaj kursoj ne plene kontentigas nin, ne kontentigas ankaŭ la verkinton, malgraŭ la fakto, ke lia malnova lernolibro La Komencanto, rikoltis ankaŭ ekster nia organizo multan laŭdon. Parto de la kursanaro ja ne atingas la lastan lecionon. La kaŭzoj estas diversaj; la plej grava estas, ke ne ĉiujn homojn pene laborintajn la tutan tagon allogas la seka parkerado de vortoj kaj lingvaj reguloj aplikataj en neinterligitaj frazoj, kiuj ne kapablas daŭre streĉi ilian atenton. Nur la idealistoj estas sufiĉe persistemaj, sed ni volas atingi **ĉiujn** laboristojn kaj inspiri al ili nian idealon.
Por nia simpla lingvo oni atendas simplan instruadon kaj pli baldaŭan rezultaton. Tial multaj el niaj kursgvidantoj provis ankaŭ la t.n. rektajn metodojn, sed la sperto instruis ĝenerale, ke tamen la gramatika metodo por ni laboristoj estas preferinda, kondiĉe, ke ĝi estu faciligata kaj agrabligata sen malutilo por la serioza studado.
En **Facile Lerni Esperanton** k-do de Bruin penis ligi la facilon kun la agrablo kaj la seriozo. Lia nova lernolibro estas kvazaŭ „intermetodo" bazita sur la plej novaj ideoj pri la tekniko de lingvo-studado, adaptita al la specialaj ecoj de Esperanto kaj al la spertoj akiritaj dum la instruado de ĉi tiu lingvo al laboristoj. Ĝi diferencas de lia malnova en diversaj rilatoj:
La kursano komencas tuj per simpla, sed flua kaj interesa esperanto-teksto — rakontoj, anekdotoj k.t.p. — kies tradukon li trovas apude. Laŭ ĉi tiu esperanto-teksto la aŭtoro klarigas sur apuda paĝo nederland-lingve la gramatikajn regulojn. La vortojn la kursano parkeras aŭtomate dum la ripetado de la plena teksto. Vortlistojn por lerni parkere oni do ne trovos en ĉi tiu libro. Lia skriba hejma tasko ne estas granda; ĝi konsistas el respondado de demandoj pri la legita esperanto- teksto kaj tradukado de kelkaj frazoj kaj derivitaj vortoj. Krom tio li devas relegi la pritraktitan tekston, per kio li baldaŭ kutimiĝas al la esprimado en Esperanto.
La ĉefa rakonto kondukas lin en la esperantistan vivon. Ĝia interesa enhavo sendube faros lin scivola pri la daŭrigoj en la sekvontaj lecionoj. Legante pri la esperantista familio van der Wal, li ekkonas pli proksime nian tutmondan interfratigan celon, en kiu li — espereble — trovos instigon persisti ĝis la fino, kiam li aliĝos al nia Asocio kaj mem praktikos la lingvon, same kiel la familio van der Wal....
Atendante pri ĉi tiu nova lernolibro la juĝon de la sperto, mi deziras al ĝi tian sukceson, kian nia movado bezonas kaj kian meritas la aŭtoro pro sia granda penado.

P. S. Daŭrige al ĉi tiu lernilo k-do de Bruin verkas legolibron sub la titolo **Facile Legi Esperanton,** en kiu ankaŭ kelkaj malpli facilaj gramatikajoj estos klarigataj. Ni klopodos aperigi ĝin antaŭ la finiĝo de la ĉi vintraj kursoj. F. F.

KOMITATO „POR NIA PREZIDINTO".

Al la estraroj de ĉiuj distriktoj kaj sekcioj. Kvankam ni ne intencis publike trakti ĉi tiun delikatan aferon, tamen montriĝis necese doni kelkajn klarigojn.
Multaj sekcioj jam sendis aprobajn leterojn kun monsumo aŭ mencion pri la sendo de monsumo. Aliaj petis informojn pri la pagenda sumo.
Gekdoj, vi bonvolu konsideri, ke la komitato celas libervolan pagon, sekve ĝi ne povas kaj ne rajtas fiksi difinitan sumon. Ĉiu sekcio aŭ distrikto mem aranĝu tion.
Kelkaj sekcioj donis imitindan ekzemplon per tio, ke, krom donacon el la sekcia kaso, ili kolektis monon ankaŭ inter sia anaro. Tiel la monsumo ne nur altiĝas, sed per tio ĝi efektive fariĝos donaco de la tuta asocia anaro.
Sekcioj, kiuj ne disponas pri Ĝirnumero povas pagi ankaŭ per poŝtmandato.
Krome ni petas ne tro longe prokrasti la monsendon, por ke ni baldaŭ povu efektivigi nian planon.

Por la komitato
P. Lamfers, Sekr.

KORESPONDI KUN GERMANIO.

Antaŭ nelonge vizitis nian grupon kelkaj francaj gekamaradoj, kiuj per biciklo tramigris nian landon. Inter ili troviĝis instruistino kiu momente dejoras en la franca zono de Germanio. Tie ŝi renkontis multajn Germanajn Esperantistojn, kiuj deziras ekkorespondi kun eksterlandanoj, kio pere de la ordinara poŝtvojo ankoraŭ ne eblas, pro malpermeso en tiu lando.
Kvankam regas ankoraŭ multaj skrupuloj kontraŭ Germanio, ni tamen ne forgesu, ke inter la korespondemulaj esperantistoj germanaj ekzistas multaj, kiuj laŭ sperto de la supronomita franca instruistino, jam en la komenco de la milito estis enŝlosataj en malliberejoj aŭ koncentrigejoj **pro agadoj por Esperanto**. Nun, liberigitaj, ili sopiras rekomenci sian propagandon por nia komuna afero kaj por tiu celo ili petas nian helpon pere de korespondado.
La franca instruistino prizorgos la kontakton. Skribu do, se vi deziras akcepti niajn germanajn gefratojn en niaj Esp-vicoj, al kamaradino **Klodja Demangel. Instruistino, S.P. 58. 434 — B.P.M. 519. Francio.**
D. K.

★ LIBRO-SERVO

Postbus 8002, Amsterdam-W.
Postgiro 111278.

FACILE LERNI ESPERANTON

Het nieuwste leerboekje van G. P. de Bruin. Beoogt op nog gemakkelijker wijze dan voorheen, Esperanto te leren, en wel door het woorden-leren zo te regelen, dat het niet meer als een afzonderlijk woordenleren wordt gemerkt. Bijzonder geschikt voor cursusonderwijs. Prijs ƒ 1.10.

VOOR VERVOLGCURSUSSEN

Post la Kurso, door G. P. de Bruin .. ƒ1.20

La Forto de l'Vero, door Adri, een romannetje in Esperanto, eenvoudig en oorspronkelijk, zeer geschikt voor hen, die zich nog niet aan een literair werk durven wagen; aanbevolen ter afwisseling van grammaticale studie op vervolgcursussen ƒ1.65

Pli ol Fantazio

de Agnes Bögh—Högsted; el la dana lingvo tradukis C. Graversen. Kvin noveloj „verkitaj en interesa maniero, kaj per bona observemo, tiel ke oni legas ilin kun plezuro" (Heroldo); la unua alialande eldonita verko, kontrolita de Litertura Komitato de F. L. E. Prezo ƒ2.10

DENOVE LIVEREBLA

La Sankta Biblio ƒ4.50

De Esperanto-Literatuur in Vogelvlucht, door G. P. de Bruin ƒ0.60
Voor propaganda-doeleinden, maar ook voor den esperantist, die een overzicht wenst van wat er al zo in Esperanto verschenen is.

PROPAGANDA OOK NA DE GROENE MAAND

We beschikken thans over een 3-tal affiches:
de grote met ster en vredesduif ƒ0.18
en met „Sloopt de taalmuren" ƒ0.08
klein formaat „Esperanto en de nieuwe tijd" ƒ0.12
Gedocumenteerd propaganda-nummer van L. E. ƒ0.05
Wat zeggen zij over Esperanto? ƒ0.02
Esperanto juist nu, 2e druk ....

Malgranda revuo.

Kiu interesiĝas pri tutmonde gravaj aferoj kaj aktualajoj en belstila Esperanto, legu: *Malgranda revuo*
kvaronjare aperanta 32-paĝa revuo pri literaturo, kulturscienco, aktualaj kaj diverstendencaj temoj, sub redaktado de Stellan Engholm kun diversnaciaj kunlaborantoj.
De tiu ĉi literatura kaj aktuala revuo sub redaktado de la konata verkisto Stellan Engholm aperis la ĉi jara 3a numero. Oni mendu tuj ĉe nia Libroservo. Ni disponas ankoraŭ pri kelke da antaŭaj numeroj (1-4, 1945 kaj 1, 2, 1946). Prezo ƒ 0.50 por ekzemplero.

La tasko de la gazetarservanto

Montriĝas foje nebona kompreno pri la graveco de tiu funkcio. Kial la gazetarservo estas tiel grava por ni? Ĉar en ĉiu domo oni legas gazetojn. Per tiuj gazetoj ni povas influi la publikan opinion.
Kiam komerca entrepreno volas altrudi al la amaso siajn varojn, ĝi uzas la gazetaron. Ĉiuj registaroj nun havas instituciojn por propagando kaj klarigado. Tiuj uzas por siaj komunikoj la gazetaron. El ĉi ĉio pruvigas, ke la gazetaro ludas gravan rolon en la nuna ĉiutaga vivo. Ni ne povas ne klopodi uzi tian gravan ilon en nia propagando. Kompreneble estas ne facile nun enpresigi ion en la gazetaro pro manko de papero. Tamen jam multaj gazetoj estas al ni favoraj. Aliaj nepre rifuzas lokon por niaj sciigoj. Kiel ni ŝanĝu tion? La nura rimedo estas persona kontakto. De el la centra punkto ni ne sufiĉe povas persvadi la redakciojn.
Kion ni presigu? De tempo al tempo ni dissendas ekzemplerojn de la Dokumenta servo. En ĝi troviĝas sciigoj pri nia lingvo kaj movado. Se eble ni aldonas al tio artikolon. Nia artikolo „Dro Zamenhof, Bouwer aan de Wereldvrede" aperis en 30 gazetoj, inter kiuj unu en Bruselo. Nia komuniko pri nia 27a kongreso aperis en 25 gazetoj. Sed oni ne atendu materialon nur de ni. Vi ankaŭ prenu novajojn eka el L.E. Aŭ vi mem verku malgrandajn artikolojn propagandcelajn.
Vi sendu la gazetojn enhaventaj novajon al ni, ĉar ni notas, eltondas kaj kolektas ĉion en diversaj rubrikoj. Tial ni bezonas 2 aŭ 3 ekzemplerojn. Tamen ankaŭ vi kolektu la gazetarsciigojn, por ekspozicioj, por pendigi antaŭ fenestroj kaj via cetera propagando. Sed ne nur la de vi prezentitajn novajojn sendu al ni! Ĉion, kion ki trovas pri internacia lingvo. Ni nepre sciu, kio vivas en la mondo rilate internacian lingvon. Sendu niajn komunikojn al la sidikataj jurnaloj, la semajnaj jurnaloj de partioj aŭ grupoj.
Estas en nia asocio grava kategorio de membroj, kiu bonege povas helpi en ĉi tiu laboro. La generalaj membroj, ofte tre izolitaj kaj dise loĝantaj, en regiono, kie ne estas sekcio nia. Ili povas esti la kontaktpunktoj por nia movado tie, kie ni ĝis nun ne havis influon. Generalaj membroj, anoncu vin tuj por tiu laboro al la sekretario de via distrikto.
Resume la gazetarserva laboro do estas:
1e. Serĉi buŝan kontakton kun redakcioj; 2e. Verki artikoletojn aŭ uzi la materialon de la Asocio; 3e. Sendi al la gazetarservo 2 aŭ 3 ekzemplerojn de gazetoj, enhavantaj ion pri, por, pro aŭ kontraŭ Esperanto; 4e. plej fervore agi por la propagando de Esperanto!

A.N.M.B.

Dum la 10a ĝis 12a de Julio okazis en Amsterdamo la kongreso de la Ĝen. Ned. Metalisto-Asocio (A.N.M.B.)
En ĉi tiu kongreso Kupers, la prezidanto de la Nederlanda Ligo de Sindikatoj (N.V.V.) paroladis pri la unueco, nacia kaj internacia en la sindikata movado. Dum la diskutoj k-do Verstraeten el Utrecht diris kelkajn propagandajn vortojn pri nia lingvo kaj demandis al Kupers, ĉu li ne opinias necese akcepti Esperanton kiel plej taŭgan interkontaktilon por la tutmonda laboristaro en la internaciaj kongresoj?
La respondo estis tia, kian ni atendis.
Antaŭ kelkaj semajnoj li estis en Moskou kaj denove li spertis, ke fariĝas tempo por akcepti en internaciaj kongresoj unu lingvon. Ĉu esperanto? Ne, li iom hezite staras kontraŭ tiu lingvo. Akcepti la Anglan lingvon, estas multe pli bone, li diris, ĉar ĝi estas facila kaj kelkcentoj milionoj da homoj jam parolas ĝin. Iom poste tamen li diris, ke ne ĉiuj homoj volas paroli la anglan lingvon, ĉar en Moskou li renkontis iun Ruson kiu bone parolis angle, sed ĝin ne volis uzi, kaj Meksikano kiu ankaŭ povis paroli angle diris: „Mi nur parolas hispanlingve, ĉar ĝi estas mondlingvo!"
Tiel parolas gvidanto de la plej granda sindikata ligo en nia lando do ni rajtas konkludi, ke li ankoraŭ neniam serioze pripensis la „problemon" de mondlingvo.

H. J. Scholsman.

INSTRUA SERVO

Jam kelkfoje montriĝis, per leteroj aŭ diroj, miskompreno pri la taskoj de Instrua Servo. Ni klarigu kelkajn aferojn por forigi malĝustajn opiniojn, ĉar jam montriĝis, ke kelkaj funkciuloj praktike aludis pograndan mendon de nia materialo por propraj kursoj, kaj tio ne estas dezirinda.

Kio estas la tasko de Instrua Servo?

1e. Plifortigi nian instruan kaj organizan gvidantaron, tiom kvante kiom kvalite, laŭ unuforma modelo por la tuta organizo.
2e. plifortigi la kvanton kaj kvaliton de nia movado per instruado al ĉiuj interesiĝantoj, kiuj estas neatingeblaj per sekciaj aŭ distriktaj kursoj.
Ambaŭ punktoj indikas klerigan kaj instruan karakteron; estas do ne mirige, ke la iniciatintoj de la Instrua Servo planis kursojn por la tuta organizo por atingi sian celon.
Por efektivigi punkton 2an oni pretigis skribajn elementan kaj A. kursojn. Plenume al punkto 1a aranĝiĝis A- kaj speciale B-kursoj (kaj eble sekvos funkciula kurso). Pri la bezono de skribaj elementa kaj A-kursoj atestis la sukceso en la pasinta jaro kaj la nuna kunlaboro de ĉiuj FLE-anoj en la varbado. La gravan bezonon pri B-kurso pruvis multege da petoj al la anstataŭinto de I.S. (la Studa Servo), kiu devis seriluziigi sufiĉe da interesiĝantoj pro malabunda kunlaborantaro, ĉar precipe B-kurso postulas vastan kunlaboron de niaj plej spertaj membroj.
Kaj nun.... I.S. petis al ĉiuj kompetentaj gekamaradoj akcepti taskon en ĝiaj kurslaboroj.
Ni kuraĝis peti tion, ĉar ni scias, ke ĉiuj membroj de nia asocio, tiom en la urboj kiom en la vilaĝetoj povos profiti ilian kunlaboron, ĉar ni scias, ke sen tiu kunlaboro nepre ne povos plialtiĝi la lingva nivelo en granda parto de nia organizo. Ĝuste kaj nur pro tio ni kuraĝas ankaŭ peti al ĉiuj FLE-funkciuloj ne konkurenci nian B-kurson per propra aranĝo. Aliflanke ni forte instigas la distriktojn kaj sekciojn aranĝi prelegvesperojn paralele al nia B-kurso.
Nur harmonia, racia labordivido promesas riĉan rikolton!

v. L.

Responde al multaj demandoj:

Librojn k.t.p. oni mendu ĉe Libro-Servo, Poŝtkesto 8002, Amsterdam-W.
Lingvajn demandojn oni direktu al Redakcio de „La Progresanto".
Anoncojn por skribaj Elementa, A- kaj B-kursoj oni sendu al: Instrua Servo, k-do H. Kuyt, Ruyschstraat 131², Amsterdam-O.

★ ANONCOJ

ESPERANTO-RADIOCURSUS

Op *Zaterdag, 12 Oct. e.k. te 14 uur*, begint op de Vlaamse golf van het N.I.R. (321,9 M.) De lessen zullen om de week aan de inschrijvers worden gezonden; ze zullen o.a. steeds de verbetering bevatten van de vorige oefening.
Inlichtingen, op- of aanmerkingen worden talrijk en dankbaar tegemoet gezien door het

Nat. Inst. voor Radio Omroep,
Esperanto-Kursus
Flageyplein, Elsene — Brussel.

Klemens Wiećorek, Toepferberg No. 1, Loebau, Sachsen, Russenzone 10, deziras korespondi pri temoj sciencaj kaj liriko, interŝanĝas librojn kaj gazetojn.

Amatora Filozofo dez. koresp. pri dialektika pensado k. ĝiaj rezultoj. Skribu al C. Joon, Noord A 31, Schagen (Holland).



EL LA DISTRIKTOJ

DISTR.: GELDERLAND.
Sekr.: Amsterdamseweg 30, Arnhem.

Post kvin jaroj da ripozo, en Septembro denove aperis la distrikta bulteno por Gelderland „Nia interkontaktilo". Celo de ĝi estas konigi ĉiajn sciigojn de la distriktestraro, enpresiĝo de sekciaj sciigoj kaj cetere ĉio, kio povos servi al nia distrikto kaj la asocio. Redaktoro estas: k-do H. W. Altena, Hellenraetplein 9, Zutphen. Por tiuj, kiuj deziras interŝanĝi ĉi gazeton kun eksterlandaj korespondantoj, ni disponigas ekzemplerojn po 10 cendoj. De tiuj instancoj de nia asocio kiuj eldonas samspecajn bultenojn, ni volonte ricevos (se eble du) interŝanĝnumerojn.

DISTRIKTO: GRONINGEN—DRENTE.

La sekciaj kasistoj kaj la ĝeneralaj anoj en nia distrikto, notu la ĝirnumeron de la distrikta kasisto, No. 304272, je la nomo de Joh. Kuiterman, Eigenhaardweg 14, Emmen. La ĝeneralaj anoj bonvolu ĝiri al li la kotizon, estante *f* 3.60 jare; alie li devos enkasigi ĝin per poŝtkvitanco.
La sekciaj kasistoj atentu, ke ili krom la distrikta kotizo ankaŭ sendu la asocian kotizon al la distrikta kasisto. La kasisto.

DISTRIKTO ZEELAND.
Sekr.: E 45, 's Heer Arendskerke.

La distrikestraro nun konsistas el la jenaj gek.doj:
Prez.: J. J. Houtekamer, Rithemsestr. 65, Souburg; Sekr.-kasisto: C. M. Wiskerke, E 45, 's Heer Arendskerke; Asesorino: k-dino A. du Bois, Langestraat 13, Hoek.
La 16-a de Septembro kunvenis la Goesaj esperantistoj sub gvidado de J. J. Houtekamer, prez. de la distrikto, kiuj fondis la sekcion Goes. 8 anoj aliĝis. Prez. fariĝis W. Stevens, Willem Zelleweg 27; Sekr. C. Rijn, Oude Singel 52; kaj kasisto k-dino A. Koppejan, Kamperfoeliestraat 21.
La distrikt-prezidanto donacis la unuan libron por la biblioteko. La duan donacis k-do Soeters.
Poste ni rememoris la junan Goesan F.L.E. pionirinon, k-dino Tonny Boon, kiu kun granda fervoro laboris por nia movado, sed bedaŭrinde post longdaŭra malsano, tro frue mortis.
Post priparolado de la propagando-semajno, la nova prezidanto fermis la unuan kunvenon de la Goesa sekcio, kiu nomiĝos „Konstruu la pacon". C. M. Wiskerke.



EL LA SEKCIOJ

SEKCIO: A'DAM II. „Ni volas lumen".

Pro sia malbona sanstato k-do Visser eksiĝis kiel sekretario.
K-do J. Lamfers anstataŭos lin. Lia adreso estas Tuinbouwstr. 140 hs.

SEKCIO: AMSTERDAM XI, „La Insuloj".
Sekr.: Blankenstraat 191 A.

Ŝanĝiĝis nia sekcia numero. Anstataŭ sekcio 17a ni nun estas la 11a.
Ni malaltigis la kotizon ĝis 25 cendoj depost Septembro.
En nia jarkunveno ŝanĝiĝis la sekretariejo. K-do W. Amesz anstataŭis K-don Munnik, kiu transloĝiĝis al Epe, kaj K-do G. J. Burgman transprenis la taskon de K-do C. v. d. Berg kiel prezidanton.
Nia sekr. vojaĝis dum 5 semajnoj en Aug. kaj Sept. en Norvegujo, Svedujo kaj Danujo. Mi instigas vin regule viziti la konversaciajn vesperojn, ĉar li neatendite parolos pri sia vojaĝo.
Jen ankoraŭ la adresoj de nia kasisto kaj prezidanto: W. Boshuis, Blankenstraat 6^1, G. J. Burgman, Pieter Aertszstraat 83 hs.

SEKCIO. AMSTERDAM XIII.
Sekr.: Westlandgracht 145^3.

La sanstato de sekcio ofte dependas de la financa bazo.
Estas la devo de kasisto ke la afero marŝas. Sed ankaŭ la geanoj povas kunlabori. Tial mi petas la jenon: Pagu regule en la komenco de ĉiu monato (*f* 0.75) aŭ kvaronjare (*f* 2.25) ĉu en la grupo ĉu ĝire. Ne atendu ĝis kiam la enkasiganto vizitos vin. Estas anoj kiuj tuj post la liberiĝo denove aniĝis, tamen oni neniam vidas ilin. Kial ne? La konversaciaj vesperoj estas sufiĉe interesaj, do ili malpravas. Vizitu la kunvenojn kaj vi certe ne plu forrestas. Ĉu interkonsentite?
La ĝirnumero estas: Gem. Giro F 1113.
M. v. Rheenen, kasistino.

SEKCIO: ARNHEMO.
Sekr.: Schuttersbergweg 61.

Atentu pri la ŝanĝo de la sekretariejo. Ĵaudon la 29an de aŭg. ni kunvenis en „De Opbouw", por priparoli la verdan monaton. Ĉeestis nur 12 anoj. Ĉar ni bezonos ĉies kunlaboron estas bedaŭrinde, ke nur kelkaj ĉeestis.
Nia distriktgazeto ekfunkcios, artikoletojn sendu al k-do H. W. Altena, Helleraetplein 9, Zutphen. J. A. Lubbers.

SEKCIO: ENSCHEDE.
Sekr.: van Coeverdenstraat 39.

La 30an de Aŭg., nia sekcio rememoris sian 30 jaran ekziston.
Okaze de tio, ni disdonis jubilean numeron de nia sekcia gazeto „Esperanto Nieuws" en 10.000 ekzempleroj. Krom tio ni okazigis Esp. ekspozicion. Ni invitis la magistraton, ĉiujn politikajn kaj aliajn instancojn. Malgraŭ la grandioza laboro, ĝi estis vizitata de nur 150 personoj. Tio estas rilate la laboron, tre malmulta.
Vizitis ĝin ankaŭ reprezentantoj de distrikto Overijsel, la sekcioj Deventer, Hengelo kaj Zwolle. Ni ankoraŭ ne scias, kiom da kursanoj ĝi liveris. La anoj kiuj tiom bone kunlaboris meritas dankon.

SEKCIO: GRONINGEN.

La 14an kaj la 15an de Sept. ni festis nian interdistriktan semajnfinon, de Gron., Friesland kaj Drente. Kiel gastoj ĉeestis kelkaj anoj de L.E.E.N. La prez. de sekcio Groningen malfermis la festvesperon kaj dediĉis kelkajn konvenajn vortojn honore al nia mortinta F. L. E. prezidanto k-do A. Veen. Post komuna kantado Leeuwardenaj k-dinoj kantis en naciaj kostumoj eksterlandaj. K-do Munniksma raportis pri la Utrechta kongreso.
Post la paŭzo la Groningena teatrogrupo prezentis teatrajon kiu tre plaĉis.
La sekvontan matenon promenado tra la urbo, dume la distriktoj kun la sekciaj estraroj kunvenis. Post la malfermo k-do Henstra el Arnhemo parolis pri S.A.T. K-do Tjepkema pritraktis la temon literaturo.
Post kantado de Sinjoro el Stadskanaal paroladis k-do Israëls, kiu kondukis nin en la mondon de la blinduloj.
Je la kvara horo finiĝis du ĝuoplenaj tagoj en nia granda rondo familia. Ni ĝuis belan programon kaj la geludintoj vere meritis la aplaŭdojn. C. de Jager, dua sekr.

SEKCIO: HENGELO (O).
Sekr.: Wilderinksplein 13.

Jen nia unua sciigo post la liberiĝo. Okazis grava membrokunveno, komenciĝinte, kun silenta momento, honore al nia prezidinto A. Veen.
Estis priparolata la propagando en la Verda Monato. Nia programo estas sufiĉe riĉa. I.a. okazos Esperanto-ekspozicio.
Ni daŭrigos la propagandon en la gazetoj.
La nuna estraro konsistas el la jenaj k-doj Erdtsieck, prez.; H. Julsing, 1a sekr.; H. Volkert, 2a sekr. kaj gazetarservanto; E. Fuldauer, kas. kaj Beekhof, bibliotekisto.
La kurso estos gvidata de k-do H. Julsing kaj la uzota lernilo estos La Komencanto

SEKCIO: WINSCHOTEN. „La Estonto".

Op 23 Aug. j.l. werd een vergadering gehouden, om te komen tot heroprichting van de afdeling.
De opkomst was zeer goed en 15 personen lieten zich als lid inschrijven. Tot bestuur werd verkozen: Voorz.: B. Wijma, Hofstraatlaan 10; Secr.: C. de Groot, Gasthuislaan 33a; Penningmeesteres: W. de Ruiter-Boltjes, Beersterstraat 29, allen te Winschoten.
Besloten werd een cursus te beginnen en tevens iedere week een conversatieavond te houden. Algemene leden die in de omgeving van Winschoten wonen, kunnen lid worden van de afdeling Winschoten.

SEKCIO: ZAANDAM.
Sekr.: Schubertstraat 18.

Montriĝis granda intereso por ĉeesti la kongreson en Heerlen. Diversaj anoj regule aĉetas la ŝparkuponojn.
Nia propaganda kunveno okazos la 5an de Oktobro je la 8a horo en Christelijke Belangen, Bootenmakerstraat. Kunlaboros Sro v. d. Berg violonisto, la Verdaj Steloj, kantos por ni esperante kaj holand-lingve S-rino Hekkert van Eijsden (pianludado Tine Verhoef) k.t.p.

La 29an de aŭgusto, mortis post mallonga malsano, nia fervora k-do

J. VAN DER PLAS

en la aĝo de 53 jaroj. Nia sekcio perdis ne nur simplan anon en li, sed ankaŭ sian S.A.T. peranton. Li ĉiam fidele vizitis niajn konversaciajn vesperojn kaj estis fajra propagandisto por nia idealo.
La Estraro de Sekcio Rotterdam II.

ANONCOJ.

Deziras korespondon kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj k-dino J. Koeman-Geerlings, AmsterdamoW., Marco Polostr. 106^2, Holando. Prefere kun k-do aŭ k-dino de 20—35 jaroj. Respondo garantiata.

—

La redakcio de bulgara instruista jurnalo deziras kontakti kun geinstruistoj kaj redakcioj de instruistaj gazetoj, Redakcio de „Učitelska Borba", str. Moskovska, 29, Sofia, Bulgario.

—

Lernintoj bezonas gekorespondantojn. Skribu al f-ino Paquita Martin, Suipacha 727, Rosario, Argentino.

—

Esperantistino, 32 jara, deziras kontakton, kun samideanino, por se eble fariĝi amikinoj: Bep Brilleslijper, v. d. Helstplein 11^1, Amsterdam (Z.).

* * *

Kun granda ĝojo ni komunikas vin pri la naskiĝo de nia filo kaj frateto nomata:
FREEK.
C. C. Wals—Schrama
E. C. Wals
Bettie.
IJmuiden, la 10an de sept. 1946a.